

Strukturo de la kurso

- 1 **Metodo** - rekta, konversacia, grupa, ludiga, paroliga, verbocentra, negramatikeca. Bona rezulto dependas de flueco, de ĝustatempa rebato, kvazaŭ en flugpilka ludo. Gestado ludas esencan rolon.
- 2 **Celgrupo** - ordinaraĵoj jam alfabetigitaj en siaj naciaj lingvoj, preferinde konantaj la latinajn literojn kaj la vorto-specojn.
- 3 **Nombro da lernantoj en klaso** - minimume 12, maksimume 22.
- 4 **Intenseco** - dufoje semajne, minimume. (preferinde trifoje)
- 5 **Lecion-daŭro** - 80/90 minutoj.
- 6 **Kurso-daŭro** - 4 jarduonoj (po 2 jarduonoj ĉiu libro); proksimume 170 horoj sume.
- 7 **Celoj** - 1. Ebligi al la lernantoj produktive akiri fundamentan konon pri la lingvo, kapablon kompreni, legi, skribi kaj flue paroli. 2. Veki emon al plena posedo kaj praktika uzado de Esperanto krom emon ĝin disvastigi.
- 8 **Lerniloj** - lernolibroj 1 kaj 2 kun enaj kaj apartaj ekzercaroj kun kontrajtoj de la lecionoj kaj prononc-ekzercaroj.
Instruilaro - por instruistaj gvidlibroj 1 kaj 2. Disponblas ankaŭ interreta helpa dokumentujo kun printeblaj, surmurigaj bildaroj kaj frazaroj, ekzercaroj, proponoj pri ekzamenoj ktp, senpage prenebla kaj adapteblaj el www.lernejaklasoj.info.
- 9 **Lerno-ĉambro** - malgranda, kun spaco kaj meblaro apenaŭ sufiĉa por la celo, tamen zorgeme etosigita per didaktikaj materialoj (murafiŝoj, bildoj, nepraj frazoj ktp.).
- 10 **Ekzamenoj / taksado de rezultoj**
Teorioj ekzistas pri la valoro aŭ senvalor de sistema taksado de rezultoj de lingvo-instruado. Tiun decidon ni lasas al ĉiu instruisto aŭ postulo de la lernejo, kiu elektos nian lernilaron. Tamen, sube estas sugesto pri sukcesa formulo por taksado de parolkapablo.

Parola ekzameno

Lernanto	prononco	vortostoko	lingva ĝusteco	komprenpovo	parolflueco	kalkulo rezulto
1. Tiekio ...	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	... X 4 = 52
2. Neĝeta ...	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	... X 4 = 72
3.	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	0 1 2 3 4 5	... X 4 = 88

(La parolan ekzamenon oni povas fari unuope, duope, triope, laŭ la elektota temo por konversacio.)


Rimarkoj pri via gvidlibro

Via gvidlibro havas la ekzerc-foliojn enmetitajn ene de la ordinare sinsekve numeritaj paĝoj, laŭ ilia apero. Tio faciligas al vi proponi kaj kontroli la hejmajn taskojn de la lernantoj. En la porlernanta libro la aparta ekzercaro aperas are, je la fino, kiel enmetita kajero.

Paĝnumerigo: En via gvidlibro la numero de la paĝo de la porlernanta libro estas indikita malgrande kaj hele, por faciligi la komunikadon kun viaj lernantoj.

Marĝenoj - En la marĝenoj de ĉiuj paĝoj de via gvidlibro estas valoraj rimarkoj/indikoj/sugestoj/memorigiloj pri plej bona esplorado de tiu leciono, ekzercaro aŭ paroligilo. La aŭtoro petas de la instruistoj la komplezon ilin plibonigi per sugestoj kaj kontakti lin pri eventualaj kontribuoj. Antaŭdankon!

Antaŭrigardoj - Antaŭ ĉiuj instruunuoj estas antaŭrigardo pri la lernotaĵoj, listigitaj laŭ la paĝoj de la porlernanta libro.

Novaj vortoj - La novaj vortoj aperas en la tekstoj *pale kaj klinite*. La bildeto  indikas la numeron de la paĝo kie ili reaperas por klarigo je la laŭpaĝa vortlisto, je la fino de la libro. Enklasa klarigo pri tiuj vortoj *estu supraĵa kaj en Esperanto*. La lernantoj notu *ankaŭ supraĵe* nacilingve aŭ esperante kaj konsultu vortaron hejme por plia klarigo.

Kroma plibonigo de la tria eldono estas laŭalfabeta listo de ĉirkaŭ 900 nove aperintaj vortelementoj, je la fino de la libro.

Instruisto, esploru kaj ofte vizitu vian helpan dokumentujon (www.lernejaklasoj.info), kie vi trovos buntan helpan materialon por disdoni, surmurigi ktp.



Modelo de la lecionaj sekcioj

Iksa leciono

Titolo de la leciono

Jen kion faras la roluloj de la enkonduka teksto.

Laŭpaŝe:



1 **Esploru la bildojn.** *Silente, por imagi la senvortan historieton.*



2 **Aŭskultu silente** la konversacion. *Sen la teksto, por kompari kun la imagata kompreno.*

3 **Aŭskultu refoje.** *Legante, sekvante silente la tekston, por ligi la skribon al la sono.*

4 **Esploru la novajn vortojn** kun via instruisto.

5 **Aŭskultu refoje** por pli bone kompreni la novajn vortojn en ilia kunteksto.

6 Ekzercado



a **Ripetu grupe** ĉiujn frazojn, post via instruisto. *(nur por la 10 unuaj lecionoj)*

a **Ludu** la konversacion grupe kun via instruisto.

b **Ludu** la konversacion kun apuda klaskolego. **Atentu kaj atentigu** pri klara kaj bela prononco

c **Aktorado** - Stariĝu. **Rol-ludu** duope/triope la dialogon antaŭ la klaso. **Rigardu rekte** al

via partnero. **Ludu** per via tuta korpo, kiel bonaj aktoroj. **Uzu** viajn personajn informojn.

ĉ **Plilongigu** iomete la konversacion, laŭ via plaĉo. *(Nur ekde nivelo B1 laŭ KER laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj: lernado, instruado, pritaksado.)*

d. **Alitipaj ekzercoj.** *cerbo-ŝtormoj ktp*



7 **Komprena ekzercaro** - *individue enklase*

a Post aŭskultado kaj aktorado de la konversacio, **diru aŭ skribu ĝuste aŭ malĝuste.**

b **Ligu** la koncernajn kolumnojn.

c **Elektu a** aŭ **b** por respondi.

ĉ **Ordigu** la eventojn de la teksto.

d Alitipaj ekzercoj pri kompreno.



8 **Kiel diri** - Tiu sekcio celas la elstarigadon de la ĉiutagaj ŝablonaj esprimoj, prenitaj el la teksto kaj ripetigenda. Tiucele la instruisto insistu, ke la lernanto aktorece esprimu per sia tuta korpo tiujn frazojn.

9 **Defioj:** Ĉu vi kapablas?

a verki?

b solvi enigmojn? divenaĵojn?

c alitipaj.



10 **Paroligiloj** diverstipaj - Por kelkaj duopaj paroligiloj duonigu la klason kaj lokigu la du grupojn fronte kaj plejeble fore unu de la alia. Ili laŭvoĉe ludu kun la plej fronta kolego.

Triangulaj konversacioj estas ankaŭ tre efikaj paroligiloj. (Vidu paĝojn 118 kaj 140 de ĉi tiu gvidlibro.)



11 **Gramatikaj gutoj**



12 **prononc-ekzercoj** *(por niveloj A1 kaj A2)*

13 **Laŭ via opinio** *(Ekde nivelo B 1.)*

Ĉu la demandoj pri la teksto estas trafaj? Ĉu vi opinias, ke mankis iu grava demando? Kiujn novajn demandojn vi proponas?



14 **Hejmaj taskaroj** *(Ĉe la fino de la porlernanta libro, sed enmetitaj laŭapere en via gvidlibro)*

a kopii

b respondi

c verki

...

Konsiloj al instruistoj

Antaŭkurse, antaŭ ol organizi la klasojn, aŭ dum oni tion faras, oni muntu ekspozicion pri Esperanto en la lernejo, por varbado.

Organizinte la klasojn, oni invitu alian spertan esperantiston prezenti unuhoran “antaŭkurson”, por la tuta lerneja publiko. Ĝi konsistu el tiuj plej ordinaraj informoj kaj klarigoj pri Esperanto, sub formo de prelego aŭ similaĵo, dum kiu la ĉeestantoj libere pridemandu. En via interreta dokumentujo estas tiucelaj instrumaterialoj, tradukendaj al la nacia lingvo de la lernantoj. Indas esplori ĝin.

Por la unuaj lecionoj, se la lernantoj ankoraŭ ne havos sian libron, printu kaj disdonu paĝojn 6 ĝis 12, troveblaj en via helpa dokumentujo. www.lernejaklasoj.info.

- 1 Komencu la kurson per saluto kaj sinprezento, Cseh-metodece.
— Saluton! (Insistu ĝis plejmulto de la klaso respondu korse — Saluton!
— Saluton, mi estas Nomo. (Proponu manpremon al kelkaj lernantoj, kaj atendu reciprokan frazon:
— Saluton, mi estas... .)
— Kiu mi estas? Kiu vi estas?
... (Daŭrigu dum kelkaj minutoj, por veki emon al ludiga etoso.)
- 2 Por disvolvigo de la dua kaj ceteraj lecionoj sekvu laŭeble la modelon de la antaŭa paĝo.
- 3 Ĉiujn demandojn de la lernantoj respondu en Esperanto. Evitu traduki. Provu ĉiel klarigi per gestoj, objektoj, surmuraj bildoj, desegnaĵoj ktp, kvazaŭ vi estus fremdulo kaj vi ne scipovus la nacian lingvon de la lernantoj.
- 4 Je la komenco ne kuraĝigu ilin ofte demandi pri klarigoj. Troa interrompo ne estas bonvena. Komprenigu al ili tion, ke la klarigo de studata ero venos nature, per la varia, multeflanka ripetado. Bona fluo de la leciono garantios komprenon. Ili notu siajn *subitajn dubojn* por solvo je la lastaj kvin minutoj. Eble tiam ili ne plu bezonos helpon, ĉar la dubo ne plu ekzistos.

Kunlaboro por estontaj eldonoj

Kara instruisto, tiu ĉi instrumaterialo triafoje atingas internacian publikon. Mistraĵoj kaj misfunkciado de celata ero kaj alispecaj mankoj certe ankoraŭ montriĝos dum ĝia internacia uzado. Tial la aŭtoro petas vian valoran kontribuon por ĝia plibonigo. Bonvolu indiki ian malĝustaĵon, proponi ŝanĝetojn, aldonon aŭ deprenon rekte al la aŭtoro per la subaj retadresoj. Antaŭdankon!

lernejaklasoj@gmail.com
jofobo@hotmail.com

Antaŭrigardo

Unuo unua - antaŭprepara

<i>temoj kaj strategioj</i>	<i>lernotaĵoj</i>	<i>paĝoj</i>
<p>1 Informado pri Esperanto al la invitita lerneja publiko Nacilingva prelego kaj diskutrondo (preferinde fare de vizitanta instruisto)</p> <p>Livero kaj esploro de informa materialo de la loka aŭ nacia Esperanto-asocio kaj de la teksto "Esperanto, difino kaj celaro", kun respondfolio. (dokumentoj 1 kaj 2 de via interreta helpa dokumentujo, kiun vi anticipe traduku al la etna lingvo de la lernantoj.)</p> <p>Temoj: Bazaj informoj pri Esperanto, ĝia idearo, celaro, origino, eta historio, nunaj atingoj kaj perspektivoj.</p> <p>Klarigo pri duboj kaj misaj konceptoj pri Esperanto; institucioj kaj servoj je la dispoŝo de la esperanto-parolantoj; Pasporta Servo; KSM; kongresoj; la Jarlibro, Esperanto en interreto; bibliotekoj; fakaj asocioj; TEJO; gazetaro/periodaĵoj;</p>	<p>Esperanto, bazaj informoj Esperanto, difino kaj celaro</p>	<p>(ht 1, 2)</p>
<p>2 Ĝeneralaj informoj (al la novaj lernantoj)</p> <p>Akceptado de la lernantoj, sinprezentado de la lernantoj kaj de la instruisto.</p> <p>Ĝeneralaj informoj pri la lernejo, regularo, sistemo pri lernotaksado ktp (eksterklasa legado de koncernaj tekstoj)</p> <p>Livero kaj esplorado enklase de la didaktika /pedagogia ilaro: teksto-libro, sondisko ktp.</p> <p>"Varmigo" konversacio per plej ordinaraj Esperanto frazoj facile kompreneblaj per gestado.</p> <p>Mi estas... . Kiu vi estas? Kiu li estas? Ĉu vi estas ...? Ne, mi ne estas Ĉu ŝi estas ...?</p>	<p>Unuaj ĉiutagaj frazoj</p>	<p>(ht 1, 2)</p>
<p>3 Rimedoj: teksto: "Esperanto, difino kaj celaro", printebla el la helpa dokumentujo ĉe www.lernejaklasoj.info varbmateriale liverita de la loka Esperanto-asocio, lerneja teksto pri sia regularo, lernolibro, sondisko.</p>		

Instruisto, esploru vian helpan dokumentujon (www.lernejaklasoj.info), kie vi trovos buntan helpan materialon por disdoni, surmurigi ktp.

Esperanto - difino kaj celaro

(tradukenda nacilingven)



Esperanto estas la plej bona propono pri internacia lingvo.

Tiu aserto praviĝas, ĉar Esperanto estas la sola lingvo havanta la sciencajn ecojn, necesaj por plenumi tiun altvaloran socian rolon, nome: *neŭtraleco*, *ampleksa akcepto*, *garantio pri daŭripovo*, *logikeco*, *reguleco*, *klareco*, *facileco*, *efikeco* pruvita en la praktiko, kaj interna ideo de homa frateco.

Neŭtraleco. Esperanto apartenas al neniuj popolo kaj ne portas katenojn al religiaj, politikaj, ekonomiaj aŭ rasaj postuloj. La sola tereno kie Esperanto ne estas neŭtrala estas tiu de la socilingvistiko. En tiu tereno la apogantoj de Esperanto defendas la protektadon de kulturaj identecoj de ĉiuj homaj grupoj minacataj perdi sian idiomon pro forviŝigo kaj kun ĝi sian tutan historion kaj la valorojn de sia etno.

Daŭripovo. Pro sia propono esti *dua lingvo* kaj pro sia neŭtraleco, Esperanto havas ampleksajn ŝancojn firmiĝi kiel longdaŭra servilo, kiel ponto-lingvo inter homoj de malsamaj idiomoj kaj kulturoj.

La **taŭgeco kaj efikeco** de Esperanto estas pruvitaj en la praktiko. Oni konsideru la ampleksan jaran kalendaron de internaciaj eventoj, je kiuj Esperanto estas oficiala lingvo, la abundan kaj kreskantan sciencajn kaj literaturan produktadon kaj ĝian uzadon kiel efika plurlingva tradukilo.

La **logikeco kaj reguleco** de Esperanto estas kvalitoj kiuj multe kontribuas por ĝia sukceso. La sintezan gramatikan strukturon de Esperanto oni povas lerni tre rapide, kompare kun etnaj lingvoj. La verbaj tempoj kaj modoj de Esperanto estas tute regulaj kaj ĝian vortaron oni konstruas per aldono de afiksoj al internacie konataj radikoj.

La **klareco** de Esperanto estas admirinda. Ĝia skribo estas tute fonetika (Oni skribas laŭ la aŭdita fonemo kaj prononcas laŭ la skribo, senescepte.) Tio ebligas al komencanto prononci ĝuste ajnan nekonatan esperantan vorton, sen timo erari. Ankaŭ en la semantika kampo Esperanto estas tre klara, pro ĝia logika kaj regula strukturo.

Facileco. El tiuj ecoj de Esperanto devenas ĝia rapida kaj facila lernado, kun ŝparo da tempo, energio kaj mono.

Defenda rolo de etnaj kulturoj. Pro tio ke ĝi estas propono pri transnacia, neŭtrala lingva komunikado, Esperanto ankaŭ plej bone ilas por defendi minoritatajn kulturojn kontraŭ malaperigo. La propono estas: Ĉiu homo kun sia idiomato kaj Esperanto kiel neŭtrala ponto inter individuoj de malsamaj lingvoj.

Pri la **interna ideo**. Aldone al ĉiuj supre menciitaj mirindaj ecoj, Esperanto estas dotita, ekde ĝia naskiĝo, per speciala homliga elemento, kapabla vekti senton de monda frateco inter siaj parolantoj, kiel revis ĝia iniciatinto, Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Tiun homligan elementon li nomis "la interna ideo".

La **celaro** de Esperanto povas esti tiel sintezata: servi kiel pontolingvo en la komunikado inter homoj de malsamaj lingvoj, tiel kontribuante por la solidareco kaj respektema kunvivado inter la anoj de la homa familio.



Hejma tasko - Plenumu la hejman taskon de la sekva paĝo kaj montru ĝin al via instruisto en la sekva renkontiĝo.

Instruisto, tiun ĉi lecionon vi prezentu en du momentoj:

1. Kiel "antaŭkurso".

Nepre legu pri tio en paĝo 8.

La prelegonto traduku al sia lingvo ĉi tiun tekston aŭ verku mem sian tekston por transdoni al la ĉeestanta lerneja publiko, post lia prelego.

2. Al la esperantaj klasoj:

Invitu volontulojn voĉlegi alineon.

Post kompleta legado, invitu la klason al debato pri la tutaĵo aŭ pri elektita tekstero.

Instruisto, ĉi tiun paĝon (ht 1) traduku al la lingvo de la lernantoj kaj disdonu al la ĉeestantaro ĉe la inaŭgura leciono. De la lernantoj postulu plenumon de la hejma tasko, trovebla surdorse.



Instruisto, anticipe, antaŭkurse, traduku ĉi tiun demand-folion. Ĝi celas ne nur la novajn lernantojn, sed ankaŭ la ĝeneralan publikon de la lernejo ĉeestanta en la inaŭgura leciono.)

instruiloj: Se la lernantoj ankoraŭ ne posedas la teksto-libron, kopiu kaj disdonu la paĝojn de la unuaj lecionoj, por ebligi al ili sekvi la lecionon kaj plenumi siajn hejmajn taskojn. Tiu materialo troveblas ĉe www.lerneja-klasoj.info

Hejma tasko pri la antaŭprepara leciono

Lernanto

Respondu laŭ via kompreno de la teksto kaj laŭ via penso pri la temo. (*nacilingve*)

1 Kio estas Esperanto kaj kiu estas ĝia precipa celo?



2 Kial la **neŭtraleco** de Esperanto donas al ĝi avantaĝojn por meriti sian elekton por la rolo de internacia lingvo?

3 Kiel Esperanto povas helpi al la protektado de la minoritataj lingvoj kaj kulturoj?

4 Kiuj kvalitoj ebligas al Esperanto esti la plej facile lernebla lingvo?

5 Libere diru vian impreson pri Esperanto aŭ pri iu alia aspekto de la temo lingvo internacia.

Instruisto, en la flankaj kaj subaj marĝenoj vi trovos, interalie, avertojn pri la ekzisto de helpaj materialoj, kiun vi povas surmurigi, eltondi, disdoni al la lernantoj ktp.

Antaŭrigardo

Unuo dua - celoj: komenci kaj vivteni baznivelan komunikadon en plej rutinaj socikulturaj situacioj

<i>Komunikaj lertecoj kaj temoj</i>	<i>Kiel diri</i>	<i>lernotaĵoj</i>	<i>paĝoj</i>
saluti	— Bonan matenon! Bonan tagon!	salutoj plej uzataj	6
komunikiĝi kun la instruisto	— Bonvolu ripeti. — Kion signifas...?	frazaro enklasa	8
literumi kaj kontroli literumadon	— Bonvolu literumi vian nomon. — Ĉu T-I-C-O-R ? — Ĉu vi bonvolus... ?	la alfabeto, literumado familiaj kaj personaj nomoj esprimoj la silabo, plej sona silabo kanto <i>Alfabeto de Esperanto</i>	9 9 10
lertiĝi pri prononco per kantado		prononc-ekzercado	10-12
lertiĝi pri prononco		distingado de literoj: u de ŭ , j de ĵ , r de h , c de k	
identigi homojn	— Permesu min. Ĉu vi estas Karlo? — Jes. Mi estas. (Ne. Mi ne estas.)	jes/ne demandoj esprimoj: Permesu min.... Kiel?	13
saluti kaj respondi al saluto	— Saluton, Maria. Kiel vi fartas? — Saluton! Mi fartas bone, dankon.		
konatiĝi en Esperanto sin prezenti	Ĉu vi estas ...? — Saluton. Mi estas Harada Cukuru. — Saluton, Tsukuru. Mi estas ... — Mia nomo estas Renato Roko. — Mi ĝojas koni vin, S-ro Roko. — Kiu estas via nomo? — Mia nomo estas Maria. — Kio estas tio?	verbo esti personaj pronomoj: mi , vi ... posedaj pronomoj mia ..., via ... informo-demandoj Kiu? pioniroj de Esperanto. objektoj en la klasĉambro	15 16 17 18
konversacii pri la klasĉambro nomi objektojn	— Tio estas ... — Ĉi tio estas...	Kio? Tio, Ĉi tio	

Instruisto, kutimiĝu konsulti ĉi tiujn subajn margĝenojn, antaŭ ol komenci novan lecionon, serĉe de konsiloj pri plej efika agado.

1^a Leciono

Salutoj

Aŭskultu kaj lernu la salutojn.

1


Bonan matenon!

1 La suno leviĝas.



Bonan tagon!


Bonan tagon!



2 La tago lumas.

Saluton!

Saluton!



3 Simpla saluto.

Ĝis revido!

Ĝis!



4 Ili adiaŭas.

Bonan vesperon!

Bonan vesperon!



5 Ili renkontiĝas nokte.

Bonan nokton!

Bonan nokton!



6 Ili adiaŭas nokte.

Instruisto, kontrolu la hejman taskon de la antaŭ-prepara leciono.

Kontrolu grupe la respondojn al demandoj 1 ĝis 4. Proponu al kelkaj volontuloj individuan opinion pri demando 5.

Antaŭ ol malfermi ĉi tiun paĝon, komencu la lecionon per saluto kaj sinprezentu:

Saluton! Insistu ĝis plejmulto de la klaso respondu korse: Saluton!

Saluton, mi estas Profesoro Ikso. (Proponu manpremon al du/tri lernantoj, kaj atendu reciprokkan frazon: **Saluton**, mi estas...)

Instruisto, klarigu nacilingve pri la sontrakaro kaj la bildetoj.




Lernanto, memoru preni el www.lernejaklasoj.info la sontrakaron de la lecionoj.



Numero helgriza 6 sube estas la numero de la paĝo de la porlernanta libro, por faciligi al vi la komunikadon kun viaj lernantoj.



1



7 Ŝi demandas pri lia sano.



9 Li respondas pri sia sano.



8 Li respondas pri sia sano.



10 Li prezentas amikinon.



11 Ili respondas al prezento.



Parola ekzercado

- a *Ripetu la frazojn post via instruisto.*
- b *Stariĝu. Ludu per salutoj kun kolegoj.*



Esploru la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 129.



Signifo de la bildetoj en la marĝenoj: aŭskulti; vidi; paroli; skribi; **NV** novaj vortoj

Instruisto, printu la bildojn pri salutoj kaj enklasa frazaro el via helpa dokumentujo kaj surmurigu ilin dum ĉirkaŭ tri semajnoj. (ht 4 ĝis 18)

Instruisto, la duobla vertikala streko || sugestas al vi fari paŭzeton por ke la lernantoj ripetu, antaŭ ol daŭrigi longan frazon, kiu ne havas paŭzindikon, kiel punkto aŭ komo. Tio validas nur por la unuaj lecionoj.

Tiu indikilo ne aperas en la porlernanta libro

Aktorece, ĉiam.

Instruisto, unuan fojon vi bezonas klarigi signifon de vortoj aperintaj ĉe la bildeto **NV** kaj markitaj en la tekstoj *klinite kaj per griza koloro*. Nacilingve klarigu kiel funkcias la vortlistoj de paĝoj 129 kaj 152. Tamen klarigo de vortoj devas esti laŭeble en Esperanto.

Instruisto,
uzu sekvan
strategion:

La lernantoj
silente
aŭskultu ĉiujn
frazojn.
Poste vi
ripetigu
grupe ĉiun
frazon.
Sekve la
lernantoj ludu
duope,
aktorece.

Komprenigu
al la lernantoj
ke lingvon
oni lernas per
la tuta korpo,
ĉar tiel oni
nature agas
kiam oni
ordinare
konversacias.

Enklasa frazaro



Aŭskultu kaj lernu la frazojn.



Parola ekzercado

- a Ripetu la frazojn post via instruisto.
- b Stariĝu. Ludu per frazoj kun kolegoj.



Esploru la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 130.

Instruisto, informu al viaj lernantoj tion, ke la vortoj kiuj aperas *hele kaj klinite* en la tekstoj estas nove aperintaj kaj esplorendaj kun vi, ekde paĝo 129.

Literumu vian nomon. *la alfabeto*1. Aŭskultu kaj lernu la *alfabeton* de Esperanto.

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ
K L M N O P R S Ŝ T U Ŭ V Z



2 Ripetu la alfabeton, post via instruisto.




3 Kantu por lerni. (Vidu paĝon 10.)



a b c ĉ d e f Jen la alfabeto de
g ĝ h ĥ i j ĵ Esperanto por la mondo.
k l m n o p r Mi *recitas* alfabeton
s ŝ t u ŭ v z Kaj mi literumas nomon.

4 Aŭskultu la *dialogon*.

A Kiu estas via nomo?
B Ĉulso Toki.
A Bonvole literumu || vian familian nomon.
B T·O·K·I.
A Bonvole literumu || vian personan nomon.
B Ĉ·U·L·S·O.
A Dankon.
B Ne dankinde.

Ripetu la *dialogon*, post via instruisto.5 Aŭskultu la novan dialogon. Poste **skribu** la personan kaj la familian nomon de la homo.... *Juan Saldanha* ...6 **Prononc-ekzercaro** - Aŭskultu kaj ripetu:

literoj: ŝaŝeŝiŝoŝu, ĉaĉeĉiĉoĉu, cacecicocu, ĵaĵeĵiĵoĵu,
jajejijoĵu, ĝaĝeĝiĝoĝu, gagegigogu, ŭaŭeŭiŭoŭu

7 Ekzerciĝu kun via instruisto per la prononco de la nomoj en la *kadro* suba.

8 Aŭskultu la dialogon:



A Vian nomon, bonvolu.
B Linda Darlis.
A Darling? Ĉu D·A·R·L·I·N·G?
B Ne. Ĝi estas Darlis.
A Ĉu D·A·R·L·I·S?
B Jes. Ĝuste.

persona nomo	familia nomo	<i>misa</i> literumado
Linda	Darlis	Ĉu D·A·R·L·I·N·G?
Valmor	Franca	Ĉu V·R·A·N·S·A?
Nanhu	Li	Ĉu L·E·E?
Norma	Keli	Ĉu G·E·L·Y?

9 **Paroligilo** - Elektu por vi personan kaj familian nomon el la kadro kaj ludu dialogon kun *malproksima* kolego.

Esploru la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 130.

por paroligilo
9, sube

Duonigu la
klason kaj
lokigu la
grupojn
plejeble fore
unu de la
alia. Ili
laŭtvoĉe ludu
kun la plej
fronta kolego.

Tiu ĉi estas
plurcele plej
efika
strategio.
La bruado kiu
estiĝos ne
impresu vin.
Ĝi estas
intenca kaj
enhavas
altvaloran
pedagogian
fundamenton.

Instruisto, estas printebla alfabeto en via interreta helpa dokumentujo, por surmurigo. (ht 22).

Pliaj kantoj
esplorindaj
ĉi leciono:
(de *Sylla
Chaves*, en
sia libro
*Cent Jaroj
da Kantado*)

Tri literoj,
La frazoj
estas facilaj,
Saluton,
Suno!

Prononco *plej sona silabo*



9



1. **Aŭskultu** silente *ĉiun* linion. Poste **ripetu** ĝin kun via instruisto.

1. Ĉiu vokalo (a,e,i,o,u) formas unu silabon. Unu *vokalo*, unu *silabo*.

1. 2. 3. 4. 1. 2. 3. 4. 5. 6. 1. 2. 1. 1. 2.
instruisto (ins-tru-is-to); sekretariino (se-kre-ta-ri-i-no); ies (i-es); jes (jes); tio (ti-o)

2. La *plej sona* silabo estas la *antaŭlasta*.

psikologo, inko, piro, papero, sinjoro, strategio. Ĵozianine, Ĵoziane, Ĵozias, Ĵozi.

3. **Distingu** kaj prononcu *klare* la literojn **u** kaj **ŭ**. (**ŭ** ne estas vokalo, sed *konsonanto*.)

1. 2. 1. 2. 3. 1. 2. 1. 2. 3.
Paŭlo, praulo (Paŭ-lo, pra-u-lo) Neŭza, neuza (Neŭ-za, ne-u-za)

4. **Distingu** kaj prononcu klare la literojn **j** kaj **ĵ**. (**j** ne estas vokalo, sed konsonanto.)

1. 2. 3. 1. 2. 3. 1. 2. 1. 2. 3. 4.
krajono (kra-jo-no), ĵurnalo (ĵur-na-lo), jupo (ju-po), Ĵurasio (Ĵu-ra-si-o)

5. **Distingu** kaj prononcu klare la literojn **r** kaj **h**.

Romo, homo; rara, haro; rimo, himno; reto, herbo; rito, hidro.

6. **Distingu** kaj prononcu klare la literojn **c** kaj **k**.

paco, peko; Ticor, tiko; ekonomiko, pacienco; parenceco, skribi.



Enklasa ekzerco: Iru al la skrib-tabulo kun kolego.

Ludu dialogojn *similajn* al tiuj:

- A Kiu litero estas tiu? (S)
B Mi *kredas* ke ĝi estas litero C. Ĉu mi *pravas*?
A Ne, vi ne pravas. Ĝi estas litero S.
A Ĉu tiu estas litero Ĝ?
B Ne. Ĝi ne estas. Ĝi estas litero Ĵ.



Kantu por lerni.

Alfabeto de Esperanto



3

C G⁷ C

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P

G⁷ C G⁷

R S Ŝ T U Ŭ V Z Jen la al fa-be-to de Es-pe-ran-to por la

C G⁷ C

mon-do. Mi re - ci tas al-fa - be-ton kaj mi li-te-ru-mas no-mon.



Esploru la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 130.

Instruisto, preparu eltondaĵojn por paroligilo 2 de paĝo 18. (el la ĉeestlisto de la klaso)

Prononc-ekzercado

Post ĉiu frazo paŭzigu la sonaparaton kaj la lernantoj ripetu ĝin.



10



Aŭskultu kaj ripetu la frazojn post via instruisto. (*Ne gravas nun la signifo de la vortoj. Gravas klara kaj bela prononco.*)

Lernu prononcon || per trafikaj frazoj.
Kamparanoj kantas kune || sub la luna lumo.
Ĉu juna Ĉiĉi || maĉas ĉion ĉemane?

Ĉu per sapo || bufo lavas sin?
Ĉarma Ĉiĉi Ticor || loĝas tie.
Ĝilo ĝuis ĉinan ĝinon || kun granda ĝojo.

Homoj ŝatas loĝi || en helaj hejmoj.
Hundoj jelpas, hojlas, hurlas, bojas.
Mastrino tintis tintilon, servistino venis kure.

Ĉu ajlo kun mielo kombinas?
Rato ronĝis robon || ĝis ĉifonigo.
Kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas.

Viro vera || ĉiam diras veron.
Ne ŝarĝu vin || per ŝarĝo fremda.
Ĉu lano estas ŝafa ŝelo?

Rimarko: En la alfabeto de Esperanto ne ekzistas la literoj Q X Y W. *Tamen* vi devas lerni iliajn nomojn, por literumado: Q: kuo, Y: i greka aŭ ipsilono, X: ikso, W: *duobla v* aŭ *vavo*.



11



Komparado - (*Ne gravas nun la signifo de la vortoj. Gravas klara kaj bela prononco.*)

celo, ĉelo; selo, ŝelo; peco, peĉo; pesi, pezi;
ame, ami; ĝene, ĝeni; ago, agu; gusta, ĝusta;
juro, ĵuro; oro, horo; roko, hoko; ajlo, hajlo;

ia, ja; ie, je; iu, ju; fojno, feino; prujno, ruino;
Kanado, knabo; kavita, kvita; kovanto, kvanto;
alto, aŭto; felto, feŭdo; tial, adiaŭ; iam, ian; iom, ion;

avo, havo, ravo; ero, eĥo; kolero, ĥolero;
sako, ŝako; serĉo, ŝerco; severa, sfera;
eskalo, skalo; eskarpo, skarpo; establi, stablo;

gaso, gazo; raso, razo; dia, ĝia; diri, ĝiri;
tia, ĉia; tie, ĉie; tio, ĉio; tiu, ĉiu; sia, ĉia; ŝia, ĉia.

Mi jam povas legi Esperante!



12



Utilaj frazetoj - Aŭskultu kaj ripetu post via instruisto.

Permeson! Mi ĝojas! *Sidiĝu!* Stariĝu!
Ludu kune. Atentu! Ripetu post mi.
Skribu sur la tabulo. Lernu kantante. Ĝis!

Ekzerciĝu hejme per la helpo de
via *sondisko* aŭ kun via instruisto enklase.



Esploru la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 130.

Instruisto, antaŭpreparu la materialon uzotan por paroligilo 3 de paĝo 22, (muldbestojn, ktp). La bildoj en ht 25 ĝis 48 uzeblas por prepari kartetojn, per eltondo kaj surgluigo, se vi ne havas la muldbestojn.

Instruisto, estas serio da ekzercoj kun diktaĵo en via helpa dokument-ujo.

Estas ankaŭ proponoj pri ekzamenoj adapteblaj al viaj bezonoj.

solvo de la enigmo.

Vi diktis: **paron** da literoj, la antaŭan kaj la sekvontan: bd, dg ...

bd dg gi in
ns sv ve
ea aĥ ĥĉ ĉf
fh ĥĵ ĵu uk

kt tr rm
mĝ ĝĉ cŝ
ŝz zŭ ŭo
op pl lj jb



13



Aŭskultu kaj ripetu post via instruisto.

Plej sona silabo




intima familia dialogo,
aminda hejma etoso,
zoologia unika fenomeno,
saniga bongusta nutraĵo,
puraj aero kaj akvo,
sunovarmo vivigas arbaron,
pluvo plenigas riveron,
harmonia homa kunvivado,
homara etiko,
plezuriga laboro,
solidareco, respekto, amikeco.



Diktaĵo. Enigmo per la alfabeto

Aŭskultu la diktaĵon kaj ligu la literojn por aperigi belan desegnaĵon.



Esploru la novajn vortojn kun via instruisto ĉe paĝo 131.



14



frazetoj - Aŭskultu kaj ripetu post via instruisto.

Kiu kantas tiel bele? Ĉu tio estas libro? Ĉi tio estas seĝo.
Kiel vi fartas, amiko? Literumu Petro: P·E·T·R·O.

Paroligilo - Iru kun kolego al la skrib-tabulo. **Diktu kaj skribu** la literumadon de tri vortoj.

Instruisto, en via helpa dokumentujo estas formulo pri **mementaksado** de la lernantoj. (ht 57). Tio estas tre grava pedagogia ilo. **Atentu** pri la preparo de paperetoj por paroligilo 2 de paĝo 18.



Vortlisto laŭpaĝa

Mia unua Esperanta vortaro

aŭtoro:



Lernanto, notu laŭ via kompreno la klarigojn de via instruisto. Memoru konsulti vortaron por pli bone kompreni la vortojn. Tiel vi konstruos mem vian propran vortaron.
La afiksoj aperas **pli nigre** por ke vi facile identigu la konsistigajn partojn de la vortoj.

Paĝoj 6,7



adiaŭi
amiko, amikino
ankaŭ
aŭskulti
bona
ĉe
demandi
ekzerci
esplori
farti
frazo
ĝis
ĝojo
ili
kaj
kiel
kolego
koni, konatiĝi
kun
li, lia
ludi
la
lerni, lernanto
levi, leviĝi
lumo
mateno
memori
mi, mia, mian
nokto
nova
paĝo
paroli
per
post
preni
prezenti
pri
renkonto, renkontiĝi
 respondi
ripeti
saluto
simpla
saluto



sano
si, sia
suno
ŝi, ŝia
stari, **stariĝi**
tago
trako, son·trakaro
tre
vespero
vi
vidi, **revidi**
vorto

Paĝo 8

atenti
bildo
dankon, dankinde
esti
ĝentila
iri, el·iri
instruisto
kio
kompreni
litero, literumi
ne
pasi
oni
permeso
signifi
unu, unue
veni, en·veni
volo, bon·vole

Paĝo 9

alfabeto
du, duoble
kadro
proksima, **malproksima**
prononco
reciti
rimarki

Paĝo 10

ĉiun
klara
konsonanto
kredi, ne·kredebla
lasta, antaŭ·lasta
pravi
silabo
simila
sono, plej sona
tabulo, skrib·tabulo
vokalo

Paĝo 11

du, duobla
grava
ikso
ipsilono
kuo
nun







Handwriting practice area with 30 horizontal dotted lines.

